


# Edgar Allan Poe


Traduit de l'américain par Daniel Henry Lambert

## La Korvo



Vertiges

JEAN YVES COLLETTE EDITEUR



Edgar Allan Poe (1809-1849).

### LA KORVO

Unufoje je noktmezo, dum premate per la pezo  
De monzorgoj mi tralegis mirrakontojn de roman' –  
Dum dormeme mi legadis, jen ekfrapis kaj frapadis  
Kvazaŭ sur la ĉambra pordo frapo de amika man'.  
“Eŝtas ia vizitanto, vir', virino aŭ infan',  
Ĉu teran' aŭ ĉielan'.”

Meze de l'Decembra neĝo, kiam vintro eŝtas reĝo,  
Kaj fajrlum' groteskajn ombrojn formas kvazaŭ de fantom',  
Por ellasi la doloron, kiu ŝiris mian koron,  
Sopiradis mi Lenoron – la diin' de mia dom' –  
Kiu loĝas kaj loĝados je eterne en ĉiel' –  
Sanktulino kaj anĝel'.

De teruro kaj de ĝenoj la movad' de l'silkkurtenoj  
Min plenigis – imagaĵoj de senorda fantazi';  
Tial, malgraŭ kor' batanta, mi reŝtadis ripetanta :  
“Pacience atendanta certe eŝtas tiu ĉi  
Iu vizitanto, kiu, lacigita sur la voj',  
Min atendas nun kun ĝoj'.

Baldaŭ mi plikuraĝiĝis, kaj mi jam ne ŝanceliĝis,  
“Sinjorino, aŭ Sinjoro,” diris mi, “pardonu min,  
Sed dum mia dormetado via dolĉa pordfrapado  
Ŝajnis nura sonĝsonado, kaj mi ne elaŭdis ĝin” –  
Tuj la pardon mi malfermis grandamplekse, kaj sen bru',  
Jen mallum' – nenio plu!

La mallumon esplorante, longe ŝtaris mi mirante,  
Dubajn revojn imagante – revojn kiujn homa kor'  
Antaŭrevis jam nenie; sed mallum' profunda tie,  
Kaj silento, regis ĉie, krom la son' de l'nom “Lenor'!”  
Tiun nomon mi murmuris, kaj la eho nur “Lenor'!”  
Ripetadis kun fervor'!

En la ĉambbron reirante, je ŝpirito tremegante,  
Mi frapadon pli bruigan aŭdis. “Certe, tio,” mi  
Diris, “Venas de l'ekŝtero, lasu do al mi en vero  
Min de tiu ĉi miŝtero liberigi, por ke ĝi  
Ĉesu mian korbatadon rapidigi; mia sent'  
Diras, ‘Eŝtas nur la vent’.”

Mi malfermis la fenestron, kiam, malŝatante l'eŝtron,  
Jen majesta korv' enpaŝis el la sankta eŝtintec'!  
Ĝi sen ia vort' saluta, sed reŝtante ĉiam muta,  
Kun mieno absoluta, laŭ la mod' de l'antikvec',  
Metis sin sur la skulptitan buston de l'diin' Palas',  
Portintino de l'kiras'.

Kaj de l'monŝtra bird' la vido pleniganta min je rido,  
Pro l'impona severec' de ĝiaj trajtoj sen kompar',  
Diris mi, “Vi, malbelulo, certe eŝtas ne timulo,  
Kun mien' de altrangulo, noktvaganto de la mar' –  
Sur Plutona marbordejo kia eŝtas nom' de vi?”  
“Pluneniame,” kriis ĝi.

Mi miregis ke mallerta birdo eŝtas tiel ŝperta,  
Kvankam la reŝpondo montris birdajn pensojn en malord'!  
Ĉar, dum monda historio, ĉu vidigis iam io,  
Tiel ŝtranga kiel tio – birdo super ĉambra pord' –  
Bird' nomita “Pluneniame,” bird' aŭ beŝto, en la dom' –  
Tion vidis kia hom'!

Sed la korvo, kiu sola sidis, montris sin nevola  
Pli eldiri – kvazaŭ tio eŝtus ŝpiro de l'anim' –  
Plu nenion diri provis, nek eĉ unu plumon movis,  
Ĝis diranta min mi trovis, “Ĝi sendube laŭ kutim',  
Kiel la eŝperoj miaj, morgaŭ flugos for de mi.”  
“Pluneniame,” kriis ĝi!

Per reŝpondo surprizita, ĝuŝtatempe parolita,  
“Eble tiun vorton lernis ĝi de sia posedant',  
Kiun daŭra malfeliĉo, alligita al malriĉo,  
Faris, kiel superŝtiĉo, viro kun malĝoja kant',”  
Diris mi, “pri ‘Pluneniame,’ lia sola melodi',  
Kanto de melankoli'.”

Sed de l' nokta bird' la vido pleniganta min je rido,  
Mi seĝegon remburlita ŝovis kontraŭ l'vizitant';  
Sur l'veluron sidigante, mil da pensoj kunligante,  
Mi reŝtadis pripensante, kion tiu parolant',  
Profetema, monŝtra, volis diri per nenio pli,  
Ol ĉi tiu raŭka kri'.

Tion reŝtis mi pensante, sed nenion parolante,  
Pro l'flamantaj birdokuloj, teruril' al mia kor';  
Tion mi konjektadante, mian kapon kuŝigante  
Sur l'veluron de l'kuseno – helaj pro violkolor'  
Briligita per lamplumo – kies sur violkolor'  
Ne kuŝiĝos plu Lenor'!

Tiam ŝajne per parfumo ekdensiĝis la lamplumo,  
Dum serafoj parfumilon svingis tra la atmosfer',  
Kaj tintadis sonoriloj, de feinoj muzikiloj,  
“Mizerulo, incitiloj,” mi ekkriis, “al eŝper'  
Jen de via Di' ĉeeŝtas – eŝtu tial pri Lenor'  
Forigita la memor'.”

“Ho profeto pri malbono – vi, ĉu birdo aŭ demono,  
Ĉu Satano aŭ blovego de l'infer' vin sendis for,  
Sola, sed netimigita, sur ĉi tiu malbenita  
Dezertlando ensorĉita, diru,” petis mi kun plor',  
“Kiam mi konsolon trovos? diru, diru nun al mi.”  
“Pluneniame,” kriis ĝi!

“Ho profeto pri malbono – vi, ĉu birdo aŭ demono,  
Je la ĉiopova Dio – tem' de nia altador' –  
Diru al mi kortuŝita, ĉu en paradiz' benita  
Sanktulino mi ravita (kiun la anĝela ĥor'  
Kantas je la nom' Lenoro) ĉirkaŭprenos, diru vi!”  
“Pluneniame,” kriis ĝi!

“Eŝtu tio signaldiro,” mi ekkriis, “de foriro –  
Iru for al la blovego, la Plutona noktmarbord',  
Ne eĉ unu plum' reŝtadu, ke ĝi min memorigadu,  
Ne mensogojn plu diradu, for de mia ĉambra pord'  
Prenu vian formon, vian bekon for de l' kor' de mi!”  
“Pluneniame,” kriis ĝi!

Kaj la korvo, ne flirtante, reŝtas ĉiam sidadante  
Sur la pala Palasbuŝto super pord' de mia ĉambr',  
Kaj ĝi havas pro malbono elrigardon de demono,  
Kaj sur blankon de l' plafono falas ĝia nigra ombr',  
Kaj eliĝos el la ombro – fonto de ŝpiritdolor' –  
Pluneniame mia kor'!

### *La Korvo / The Raven,*

poème d'Edgar Allan Poe (1809-1849)  
eŝt paru, en anglais, pour la première fois,  
le 29 janvier 1845, dans le *New York Evening Mirror*,  
puis, la même année, dans *The Raven and other Poems*,  
à New York, chez Wiley & Putnam.

La présente traduction en espéranto

à été créée en 1906.

Daniel Henry Lambert (1852-1930)

était un espérantiste, avocat et linguiste anglais.

© Vertiges éditeur, 2026

ISBN : 978-2-89854-779-9

Dépôt légal – BAnQ : premier trimestre 2026

– 2 780° lecturIEL –

**Lecturiels**

www.lecturiels.org